# La atesto de Carlos E. Carleos



Mi aĝis ĉirkaŭ dek unu jarojn kiam, promenante kun mia patro en la Ŝiŝona komerca foiro, renkontis budon dediĉitan al "Esperanto". Tiun vorton mi jam konis, kvankam mi ne komprenis ĝin tute. En la budo propagandis por esperanto S-ro Santiago Mulas, kiu plene konvinkis min kaj mian patron pri la bonecoj de tiu stranga artefarita lingvo. Mi estis tre legema, do mia patro koncedis aĉeti al mi interesan libron vendatan en la budo: E-Hispana kaj Hispana-E Poŝvortaro, de Eldonejo Sopena.
Ankoraŭ ofte mi portas en mia poŝo tiun bonegan vortaron. Mi ŝatas ĝin pro ĝia malgranda amplekso, ĝia kompleteco kaj ĝia konciza gramatiko, kiu enhavas klarigojn tiajn, kiajn mi trovis nenie alie.
Per tiu libro mi mem lernis la bazojn de Esperanto, kio ebligis min legi internaciajn revuojn kaj bultenojn antaŭ ol komenci lerni la anglan en lernejo (tiam en publika lernejo oni kutime komencis lerni unu eksterlandan lingvon ekde la aĝo de dek du jaroj). Mi memoras ekzemple la bultenon Esperanto-95, eldonata de franca E-grupo, kie mi ekkonis la Siberian Lulkanton de Julio Baghy.
Ŝajnas ke mi estis tiam tro juna, kaj de mia vilaĝo (Candás) mi ne kuraĝis iri al Gijón por la renkontiĝoj en la sidejo de AEA. Ankaŭ iel mi korespondis kun neniu; mi malfacile emas skribi leterojn. Do, poiome, mi perdis intereson pri E-o. Ŝajnis al mi ke neniu plu uzas ĝin. Dum la postaj jaroj mi studis la anglan kaj la francan en lernejo, kaj eksterlerneje mi provis la italan kaj la germanan. Konstatinte ke mi neniam flue parolos neniun fremdan lingvon, kaj post mia tria malsuksesa provo eklerni la germanan, mi memoris pri la instruaj avantaĝoj de E-o. Krome, jam ekzistis Interreto! Do mi ekkonsciis ke, kvankam relative malmultaj, en la planedo estis kelkaj miloj da E-parolantoj kun tre interesaj aferoj priparolindaj.
Tiam mi decidis rekontakti la lokan asocion. Mi rerenkontis S-ron Santiago Mulas (al kiu mi redankas mian enkondukon en E-ujon pri kiu li kulpas) kaj ekkonis la ceterajn membrojn de **AEA**. Mi dankas ilin ĉiujn pro la agrablaj horoj pasigitaj kune: en E-kursoj, en Zamenhofaj tagoj, en prelegoj... eĉ en la ordinaraj asembleoj! Kompreneble, **AEA** ĉiam estis kaj plu estas malfermita por kunlabori kun iu ajn interesata pri Esperanto. Ofte ni traktas kun nia frata asocio, Antaŭen el Avilés. Ni kunlaboras kun la docento de Universitato Oviedo d-rino María José Álvarez Faedo por aranĝo de E-kursoj. Ni vizitas la bienon de nia amiko Valentin', membro de Pasporta Servo, kiam li gastigas E-istojn.
Multaj karaj membroj kaj simpatiantoj de **AEA** jam forlasis nin, bedaŭrinde. Ni esperu ke dum multaj jaroj **AEA** estu utila por la movado E-isma en Asturujo. Ni plu laboru tiucele.
Por feliĉa dua jarcento de **AEA**, hura!

Estas ankaŭ ampleksa historia raporto pri la mezepokaj templo-kavaliroj tial ke tiujare estis la sepa centjaro de la procezo al tiu ordeno, kiu kulminis kun ties nuligo.
Dum tiu jaro 2007 pludaŭris la enkondukado de novaj materialoj en nian interretan paĝon. Feliĉe ni disponas je sufiĉe ampleksa storejo por tiu celo ĉe Interret-servisto kiun disponigis al ni Carlos E. Carleos. En nia paĝo oni povas trovi, krom informado pri la agado de nia Asocio, ankaŭ tradukaĵojn el naci-lingvaj verkoj, raportoj, artikoloj, kantoj, tekstoj pri historio, religio, politiko, filozofio, scienco, informadiko, recenzoj de libroj kaj filmoj… Interreto permesas transsalti, en la interkomunikado, la geografiajn limojn de la loĝloko. Eblas ke nia retpaĝo estu vidata en ĉiu ajn loko en la mondo. Fakte, ni ricevas iujn mesaĝojn de personoj el fremdaj landoj kiuj vizitis ĝin. Por ni estas tre agrabla la fakto ke de tre malproksime oni diras al ni ke oni vidis nian Esperantan materialon. Okazas ankaŭ ke en kelkaj aliaj ret-paĝoj de esperantistoj ekzistas ligiloj al la lastaj numeroj de nia revuo **HELECO**, aŭ estas tie la kompleta revuo kiun estis prenita por disponigi ĝin, ekde alies ret-paĝoj, al la interret-navigantoj. Tio signifas ke niaj Esperantaj ellaboraĵoj estas interesaj por iuj en la mondo.
Temante pri la vizitoj de geesperantistoj kiujn ni ricevas de tempo al tempo, ni devas mencii tiun de la somero de la jaro 2008. Temis pri renkontiĝo kiun havis kelkaj membroj de nia E-Grupo kun aro da geesperantistoj el diversaj landoj de la Eŭropa Unio. Tiu renkontiĝo okazis en Pruvjo, ĉe la bieno de la kuracisto Valentín Pérez, aliĝinta al la Pasporta Servo, La gastoj estis dekduo da geesperantistoj el Germanio, Britio, Polujo, kaj ĉefe Francio, kiuj adresiĝis, pere de buso speciale luprenita de ili, al Kompostelo kiel manifestaciantoj favore al Esperanto. Dum ilia vojaĝo disdonadis por-Esperantan. Sed ĉefe interesa estis alia aktivado kiun ili realigas, Temas pri vere politika aktivado okaze de la balotado por la Parlamento de la Eŭropa Unio. La geesperantistoj